**Praha-ek-1955-24-01**

No 24 A p r i l o 1955 Aperas laŭbezone.

# M I O Z O T O J

Al la mortotago de D-ro L. L. Z a m e n h o f

Estas tut-etaj bluaj floroj.
Kaj ŝatas ilin raraj koroj.
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Jen krepuskiĝas…Eĉ sen dubo
Sur frunt´ de l´ panjo naĝos nubo…
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Min regas centra maltrankvilo:
Ĉu ili kreskas en aprilo?
Ho, diru, diru al mi tion,
kie mi trovus miozotojn?
Ĉar ili havis simpation
de nia Majstro.

Eli Urbanová

-----

# NIA PREZIDENTO DAŬRE POR ESPERANTO

Esperanto-rondeto en Olomouc ricevis de Oficejo de Prezidento de la Respubliko jenan leteron, datitan de la 1-a de septembro 1954:

Responde al via peto, ke kamarado prezidento skribu mesaĝon en vian revuon PACO, ni sciigas, ke la afero ne povas efektiviĝi pro urĝa okupo de la kamarado prezidento. Ni rekomendas, ke vi vin turnu al la Ĉeĥoslovaka Komitato de la Pacbatalantoj aŭ al iu el ĝiaj elstaraj membroj, kies voĉo konvene esprimus la rilaton de nia popolo al la porpacaj klopodoj, al kiuj kontribuas ankaŭ via laboro. Ni deziras al vi, ke vi havu en ĝi multan sukceson.

Por Oficejo de Prezidento de la Respubliko: D-ro Buriánek.

Prezidento de Ĉeĥoslovaka Respubliko Antonín Zápotocký ne ŝanĝis do koncerne Esperanton sian amikan vidpunkton, kiun li siatempe publike montris per subskribo de la internacia peticio favore al Esperanto.

/Fotokopion de supra letero alportis ?-a numero de la bela cirkulero „Nia spegulo“ el Trenčín. Ni iom bedaŭras, ke tiu ĉi grava letero fariĝas nur nun konata/.

---

**Praha-ek-1955-24-02**



ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo. Depost la 19a horo samloke kurso por progresintoj, gvidata de Ant. Slanina.

Venontaj programoj:

6. 4. Josef Vítek: H. C. Andersen /Al lia 150jara naskiĝdatreveno prelegon de S. Moller Kristensen tradukis G. Kűhlmann, Kopenhago/
13. 4. Artvespero honore al L. L. Zamenhof – aranĝas Verda Ĉaro de J. Baghy. Granda salono de nia klubdomo en Smečky. Venigu viajn gekonatojn!
20. 4. František Chvatík: Ĝardenisto kaj lia kamero /kun kolorajn lumbildoj/
27. 4. Jiří Pastor: Novaj elektroteknikaj eltrovoj.
4. 5. Ladislav Kynčl: Printempo superregis nian naturon…
11. 5. Jaroslav Šustr: Nia republiko antaŭ dek jaroj… /datrevena koment./
Vuk Echtner: Plej junaj esperantistoj
18. 5. Jan Zemek: Rakonto pri Hindujo kaj gazetartikoloj de Dro L. Hájek

---

Karaj klubanoj, pripensu afable ke la komenchoro de niaj vesperoj estas la 20a horo kaj ke vi ĝenas kaj la preleganton kaj la aŭskultantoj, se vi venas malfrue. Venu laŭeble ĝustatempe kaj ni tiel povos ankaŭ ĝustatempe komenci la programojn. Koran dankon pro via kompreno!

---

SPECIALE NI ATENTIGAS!

La 13an de aprilo Verda Ĉaro de Julio Baghy respondas pri la solena programo honore al nia Majstro. Jam tiu ĉi fakto signifas vian nepran ĉeeston kaj ankaŭ devon venigi viajn gekonatojn, por ke neniu seĝo restu ne okupita.

-

La 20an de aprilo prelegas s-ano Fr. Chvatík, kiu apartenas jam al malnova generacio esperantista. Li lernis Esperanton en Bystřice pod Hostýnem, la lulilo de moravia esp.movado, kie li vivas kiel tre konata florkulturisto kaj ĝardenisto. Dum jaroj li vizitadis fremdajn landojn, kie li pere de Esp. serĉis spertojn por sia profesio. Li famiĝis per kulturado de novaj specoj de tomatoj, el kiuj kelkaj ricevis lian nomon. S-ano Chvatík estas ravita de la naturo. Kun kamero enmane li eternigis sur kolorpladoj kaj filmoj miloj da naturbelaĵoj, kiuj projekciataj ravas ĉiun homon. Ni esperas, ke lia prelego en nia klubo venigos al la vespero ĉiujn naturamikojn. Ni aŭdos pri multaj sekretoj de plana vivo kaj vidos malofte vidatajn kolorojn de la naturaj floroj, fruktoj kaj nuboj. La prelego estos plejparte en la ĉeĥa lingvo, por ke ankaŭ neesperantistoj-gastoj povu ĝis senpere aŭskulti. Tial venigu viajn geamikojn!

---

EKSTERLANDAJ ESPERANTISTOJ AL ĈSR! Atentu la fruntartikolon en nia Bulteno nro 23 kaj informu pri ĝia enhavo senprokraste vian eksterlandan korespondanton. Faru ĉion, por ke ni nunjare povu saluti en nia lando multnombrajn samideanojn el eksterlando!

---

SOMERA KOLEGIO EN ESPERANTO EN DOKSY okazos 17. – 30. VII. 1955. Ne forgesu sendi ĝustatempe vian aliĝon aŭ peti informojn! Koresponda adreso: S-ano Václav Špůr, Moskevská ul. Doksy u Máchova jezera.

---

NOVZELANDAJ ESPERANTISTOJ rememoris nin, sendinte al ni plaĉan programon de sia kongreso en Wanganui, subskribitan de ĉiuj ĉefaj funkciuloj. Dankon kaj resaluton!

---

NIA GAZETO, NIZE, nroj 1, 2, 4, 8, 9 de 1934, 6 – 9 de 1936 kaj 1 de 1937 serĉataj. Sendu rekompence por aliaj esperantaĵoj!

---

**Praha-ek-1955-24-03**



Esperanto-junularo en Praha, kiu estas sekcio de Esperantista klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2 komencis memstare kaj serioze labori en decembro pasintjare. Tiam post longa kaj vana peno trovi konvenan kunvenejon ni subite sukcesis, helpe de s-ano Vuk Echtner, trovi ĝin en Malá Strana, Maltézské náměstí, Deylův ústav /hudební škola/, unua etaĝo no 20.
Niaj kunvenoj okazas ĉiumarde; la komenco estas fiksita je la 19a horo. Fino proksimume je la 21,30 horo. La kunvenojn partoprenas plejparte gejunuloj, sed tio kompreneble ne estas kondiĉo; ĉiu, kiu sentas sin tia, estas sincere bonvenata!

Ĉi sube ni prezentas programojn de niaj kunvenoj, por aprilo. Antaŭ la UEFA programo oni informas la ĉeestantojn pri la novaĵoj de la junularmovado en nia lando kaj raportas ankaŭ pri novaĵoj el eksterlando. Sekvas gramatika parto, kie oni klarigas parte ĉeĥe kaj parte verde problemojn el Esperanta gramatiko, stilo kaj sintakso.

En literatura duonhoro vi konatiĝos kun plej famaj esperantistaj verkistoj kaj poeton, kies arton kaj nivelon vi povas mem prijuĝi, ĉar ni klopodas prezenti ankaŭkarakterizajn fragmentojn el ilia verkaro.

Celo de la lasta parto de la leciono – de historio kaj teorio de la lingvo internacia – estas: ne nur ellernigi ĉefajn faktor el historio de nia lingvo, sed montri kaj akcenti historiajn motivojn de ĝia apero kaj evoluo.

Tiuj ĉi tri fakoj estas ĉefa ohavo de nia kunveno. Krom tio ĝi estas kompletigata per legado de interesaj artikoloj kaj anekdotoj. Lastajn minutojn ni dediĉas al societaj ludoj, kiuj estas tre ŝatataj. Bedaŭrinde mankas al ni muzikisto, kiu akompanus niajn kantojn! Kvankam ni devas batali kontraŭ multaj baroj, tamen nia laboro estas vigla kaj ĝoja.

La programoj por aprilo:

| | |
|---|---|
| 5. 4. Kubelík, granda ĉeĥa artisto | … Dro Pravoslav Sádlo |
| 12. 4. Karlo Ĉapek: Blanka malsano | … A. Veselá |
| 19. 4. La eksperimento pri „Esperanto-mono“ | … Jaroslav Mařík |
| 26. 4. Esperanto kaj radio | … V. Novobilský |
| 3. 5. Kalejdoskopo | … V. Novotný |

---

Junularo en Praha invitas vin kore, ke vi partoprenu nian laboron! Vizitu niajn kunvenojn kaj fariĝu ano de la grupo! Eksterprahanoj ne forgesu informi nian delegitinon s-aninon S. Kratochvílová / Praha XX., U hranic 41/ pri via amik/in/o, kiu foriris al Praha por studi aŭ por alia celo kaj ĝis nun ne kunlaboras kun ni!

Saluton kaj ĝis la revido marde! Van

---

Centra cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈSR estas TAGIĜO, kiu estas eldonata en Opava kaj redaktata de s-ano J. Kuzník, Opava, Rooseveltova 17. La cirkulero alportas novaĵojn, konkursojn kaj belliteraturajn provojn de niaj junaj verkistoj kaj poetoj. Ne forgesu ĝin aboni /nur 8 Kč/ kaj tiel partopreni vivon de la verda junularo!

---

NI ĈIUJ NEPRE PARTOPRENU LA SOLENAN PROGRAMON DE VERDA ĈARO DE J. BAGHY HONORE AL NIA MAJSTRO! SMEĈKY 13. 4. GRANDA SALONO

---

**Praha-ek-1955-24-04**



ORA JUBILEO DE ESPERANTA EPISKOPO. Dro Antonín Eltschkner, episkopo de Praha, titola episkopo de Zephirio, dekano de metropolita kapitulo en Praha, atingis la 18an de marto 1955 kvindekan datrevenon de sia sacerdotiĝo. Al s-ano episkopo ni sendas niajn sincerajn bondezirojn.

EKP

---

HRADEC KRÁLOVÉ: La 13an de marto okazis artprograma prezentado de ĉeĥa kaj esperanta prozo kaj poezio, kun kiu alveturis al EK en Hradec nia Verda Ĉaro de Julio Baghy. Ĉefaj radoj de Verda Ĉaro, s-ino Suchardová kaj s-ano Ant. Seemann rikoltis meritintan admiron kaj aplaŭdon.

-

PŘIBYSLAV: okazas kurso en loka meza lernejo. 14 geknaboj de plej altaj klasoj vizitas kurson gvidatan de fakinstruisto Jaroslav Grodl.

-

LIBEREC: Esperantista Rondeto ĉesigis la agadon en la kadro de loka fervojista entreprena klubo kaj ĝuas nun protekton de Domo de kulturo en Liberec. Koresponda adreso: Kroužek Esperantistů Domu Osvěty, Leninova 518/4a Liberec 1.

-

MARTIN: Nova klubo, ESPERANTO-RONDETO ZK ROH Stalinovec en Martin estis fondita la 15an de februaro 1955. Kurso kun 30 personoj estis malfermita.
Adreso: Ed. V. Tvarožek, Hviezdoslavova ul. 2/III. Martin. Ni sincere ĝojas kaj al nova Esperantista rondo deziras multe da persisteco kaj multajn sukcesojn en ĝia laboro.

-

MOST. Ree aktiva. Ni legis interesan raporton de Otakar Venda, kiu revenis de soldata servo kaj tuj energie eklaboris. Kunvenoj ĉiumarde en kulturdomo de Minista klubo je la 19a horo. Al kurso anonciĝis 25 interesuloj, instruas Olga Závorková. La laboron malfaciligas nekompreno de lokaj kulturaj laborantoj.

-

ESPERANTAN FLAGON SUR KRÁLOVÁ HOĹA /monto en Slovakio/ flirtigis EK en Bratislava. Ĉi tiu revivigita klubo gvidis sukcesan kurson kun 25 lernantoj . Adreso de la klubo: Esperantský krúžok pri ZK SOR Odborárske nám. 3 Bratislava.

-

ANTONÍN CHRÁPAVÝ, vigla samideano el regiono de Ostrava, verkis por la renkontiĝo de pacbatalantoj en St. Pölten kanton „La Nova Sento“. Nun islanda komponisto Hallgrímur Jakobsson aldonis al ĝi muzikon. La kanto kun la muziknotoj aperis en junia numero de la „Paco“.

-

ANNA ALAMO-SANDGREN, kies viziton al Ĉeĥoslovakio ni ĉiuj kun ĝojo rememoras, aktivas plej intense en Svedujo, por disvastigi la Evangelion kaj Esperanton. Ni legas pri tio mirindajn informojn en la nunjaraj kajeroj de .ia? Regno, kiuj alvenis senmanke, ĉar ili estis ekspeditaj denove per registrita poŝto. Koran dankon!

-

„BAPTO“ kaj „KVAROFO“. La propono en nia pasinta Bulteno kaŭzis veran revolucion inter niaj esperantistoj. Tuj sekvan matenon antaŭ la malfermo staris ĉe la magazeno, kie laboras nia klubestro, granda vico da interesiĝantoj. Skribaj mendoj venis amase el tuta respubliko. Ni multe bedaŭras, ke ni povis kontentigi malmultajn, sed ni notis zorge ĉiujn nomojn kaj ni tre klopodos post prizorgo de nova kvanto sendi denove al kelkaj almenaŭ /absolute senpartie, tamen kun atento al regionoj malproksimaj de Praha/ po ekzemplero de tiuj ĉi serĉataj libroj. Multaj almetas poŝtmarkojn por respondo, false opiniante, ke tiamaniere ili povas nin devigi al rapida respondo. Se ili nepre deziras ĝin, ili bonvolu enmeti en la koverton ankaŭ…la necesan tempon.

-

NIAJ KANTOJ EN NORVEGIO. En raporto pri kunveno de Stavanger Esperantoklubo ni legas kun plezuro, ke ĝi krom alia agado sin okupas ankaŭ pri ekzerco de ĉeĥoslovakaj kantoj en Esperanto-traduko.

-

**Praha-ek-1955-24-05**



„PAPERA SITUACIO“ de nia Bulteno ĉiam estas malespera. Se ne estus afablaj donacintoj, kiuj donacis la paperon, aŭ kiuj ebligis al ni aĉeton de ciklostila papero, kiu estas nur malfacile aĉetebla, nia Bulteno ne estus aperinta 24 foje dum sinsekvaj 24 monatoj. Koran dankon al ĉiuj, kiuj ne unufoje solvis niajn embarasojn. Ni ŝuldas dankon al s-ino Vilémová en Uh. Hradiště por sendaĵo de bona papero kaj al vicestro de nia klubo Ant. Slanina, kiu ne unufoje ebligis al ni aĉeton de papero. Jenaj gesamideanoj ne havinte eblecon prizorgi por ni paperon, sendis mondonacojn: Lička-Ostrava-Kčs 10 kaj 5, X-Velehrad 16, 70, Kafka-Perštejn n/O 25, prof. Filip-Přibyslav 5, Mikušová-Karlovice 55, 30, Milatová-Třinec 30, Vrkoslav-Praha 6, Zemanová-Libnič 26, Týn n.Vlt. 32, Vyhnal-Prah 6, Blumauer-Praha 5, Zemek-Rumburk 6, Bis-Praha 10, Večeřová-Praha 7, inĝ. K-Praha 50, Šumavanská-Praha 15.- Vere elkoran dankon al ĉiuj! EKP

-

NANCY-Francio-festos dum junio 1955 siajn arkitekturajn trezorojn per semajna festivalo. Ek de nun, ĉiuj personoj, kiuj sendos poŝtkarton kun adreso, ricevos faldprospekton ilustritan kaj programon de la festivalo en Esperanto donace de: Turista servo, 57, rue St.Jean NANCY – Francio.

-

„AVINJO“ CENTJARA. La ĉefverko de fama ĉeĥa verkistino Božena Němcová, la „Avinjo“ aperis unue en la jaro 1855. Por festi centjaran jubileon de tiu grava okazintaĵo, aranĝis la Urba biblioteko en Praha solenan vesperon kaj preparis en siaj ejoj grandan ekspozicion. Estas tie videblaj valoraj dokumentoj pri vivo de Němcová kaj ankaŭ ĉiuj 184 ĉeĥaj eldonoj de „Avinjo“, trafa pruvo pri tio, ke tiu libro estas unu el la plej amataj de ĉeĥa nacio. Ni vidas en la ekspozicio ankaŭ 17 eldonoj fremdlingvajn, inter ili ankaŭ tiun en Esperanto, kiu aperadis en traduko de Vl. Tobek kaj K. Procházka kiel aldono al „Časopis českých esperantistů“ en la jaroj 1909 - 1914. La finaj paĝoj aperis aparte en 1921. Ni varme rekomendas al ĉiuj viziton de tiu unika ekspozicio, kiu ankoraŭ daŭras.

-

HEROLDO 1955. Ni petas denove ĉiujn aktivajn grupojn, kiuj ne atentis nian antaŭan alvokon, ke ili informu nin plej rapide pri sia deziro ricevadi dum 1955 la „Heroldon de Esperanto“. Ni devas jam definitive aranĝi distribuon por nuna jaro. La grupoj anoncu al ni adreson de persono, al kiu estas la revue liverota. Perdiĝas tro multaj poŝtaĵoj, adresitaj al Esperanto – rondetoj k. s. La elspezoj pagu al ni nur post ricevo de nia pagilo.

-

RUĜO DE HONTO kovris niajn vizaĝojn, kiam ni legis en Heroldo, ke ĉeĥoslovaka esperantisto petis nilon-ŝtrumpojn de la eldonanto de tiu revuo. Kaj ni konvinkiĝis kun profunda bedaŭro, ke tiu ĉi okazo ne estas sola. Nia konvinko estas, ke estas necese kontentiĝi pri nuna stato, kiam provizore ne estas eble mendi ion en eksterlando kaj laŭorde pagi la mendaĵon. Ni konservu homan dignon, por ke ni neniam bezonu ruĝiĝi, ke ni almozpetis!

-

LA PRELEGSERIO PRI SKANDINAVAJ LANDOJ de Josef Vítek, aranĝita de Osvětová beseda en Praha 2 en la ĵus pasinta marto, estos pro granda intereso de la publiko ripetata en majo. Aldonita estos „Danlando – lando de 500 insuloj“. Dum ĉiuj prelegoj la aŭskultantoj aŭdas pri Esperanto kaj esperantistoj kaj tiu ĉi fakto kaŭzas nian veran ĝojon. Versimile nia samideano prelegos en aprilo en Bratislava kaj en Pardubice.

---

Proksima numero aperos en majo 1955. Viajn kontribuaĵojn sendu al nia koresponda adreso: s-ano Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Prah 1.
Eldonas Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2.

BULTENO 24-1955
NIA LIBROSERVO.
TUJ LIVEREBLA: La prezoj kun afranko!

| | |
|---|---|
| ESPERANTO V KOSTCE/Šupichová/učebnice | Kčs 5,60 |
| MALÁ UČEBNICE ESPERANTA A SLOVNÍČEK/Š/ | 3,-- |
| ESPERANTO učebnice/Šupichová/ II. vyd. | 4,-- |
| ESPERANTO Snadná učebnice /Kilián/ | 7,-- |
| HOVOŘÍME ESPERANTSKY/Šupichová/ | 4,50 |
| LEGU KAJ PAROLU/Šupichová/legolibro | 6,-- |
| LIBRO DE ĈEĤO-ESPERANTA KONVERSACIO/Š/ | 5,-- |
| FRAZEOLOGICKÝ SLOVNÍK č.-e. Riedl-Čánský | 3,-- |
| GRANDA VORTARO ĈEĤA-ESPERANTA /Filip/ | 53,-- |
| SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ/Kühnl-Proch./ | 12,-- |
| SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ /BERKA/ | 3,-- |
| ČESKO-ESPERANTSKÝ SLOVNÍČEK/HROMADA/ | 2,20 |
| SLOVNÍČEK ČESKO-ESPERANTSKÝ/ČEJKA/ | 3,-- |
| MALÝ SLOV.ESPERANTSKO-SLOVENSKÝ/DOLINSKÝ/ | 12,40 |
| FILOZOFIA VORTARO /KAMARÝT/ | 11,-- |
| KANTARETO /FRATOJ FILIP/KUN MUZIKNOTOJ | 10,40 |
| REMEMOROJ DE ESPERANTISTO /ADA/ | 5,-- |
| DE APENINOJ ĜIS ANDOJ/EDMONDO DE AMICIS/ | 3,50 |
| FABELOJ DE ANDERSEN /ESP-BIBL.INT./ | 1,20 |
| BEN-TOVIT /ANDREEV/ RAKONTO | -,70 |
| PRO KIO/ARGUS/ORIGINALA KRIMINALA ROMANO | 6,-- |
| AVENTUROJ DE LA KALIFO HARUN ALRAŜID | 6,-- |
| DANCU MARIONETOJ /BAGHY/ | 12,-- |
| LA VERDA KORO /BAGHY/ | 8,-- |
| LA ARTO DE MEMDISCIPLINO /Baudoin/ | 4,40 |
| NIĈJO MENSOGULO /Bratescu-Voinesti/ | 4,40 |
| JOSEF KAJ LA EDZINO DE POTIFAR/Bulthuis/ | 22,-- |
| TAGLIBRO DE LA VILAĜPEDELO /BLICHER/ | 3,60 |
| LA HOMA LINGVO /Collinson/ | 4,-- |
| EN MALLIBEREJO/Ĉirikov/tradukis KABE | 4,-- |
| ORIENTAJ FABELOJ /Doroŝeviĉ/ | 6,-- |
| VANGFRAPO /Dreyfus/ unuakta komedio | 5,-- |
| ELEKTITAJ RAKONTOJ /Elin Pelin/ | 3,70 |
| ELZASAJ RAKONTOJ /E.B.I./ | 1,20 |
| AL TORENTO /Engholm/ novelo | 10,-- |
| ESPERANTAJ PROZAĴOJ-fabeloj kaj rakontoj | 1,20 |
| EL "NAVIGADO ESTAS NECESA"/Fock/rakontoj | 4,50 |
| DU KOKCINELOJ /Gárdonyi/trad.Kalocsay | 1,20 |
| ŜAKLUDANTO /Giakosa/teatraĵo | 3,-- |
| EL KLASIKA PERIODO DE ESPERANTO /Glück/ | 4,-- |
| REVIZORO /Gogol/ | 12,-- |
| IFIGENIO EN TAŬRIDO/Goethe/trad.L.L.z. | 12,-- |
| KRIOJ DE L' KORO /Grenkamp/ | 2,20 |
| PRI L' MODERNA ARTO/Grenkamp-Brzakowski/ | 12,-- |
| SABLEROJ /Hankel/ | 3,-- |
| GYGES KAJ LIA RINGO /Hebel/ teatraĵo | 7,-- |
| ĈE LA SANKTAJ AKVOJ/Heer/2 vol.broŝur. | 25,-- |
| LA RABENO DE BAĤARAĤ/Heine/trad.L.L.Z. | 6,-- |
| LA JUDA ŜTATO /Herzl/ | 12,-- |
| EDZIĜA FESTO EN KAPRI/Heyse/novelo | 5,-- |
| RESUMO DE UKRAINA HISTORIO/Hruŝevskij/ | 1,20 |
| MONDO KAJ KORO /Kalocsay/ poemoj | 3,-- |
| MARY KAJ SULO /Kamemoro/ rakonto | 1,20 |

UPOZORŇUJEME, že v mnoha případech jde o výtisky antikvární. Dostatečné množství je jen těch knih, které jsme tu zdůraznili podtržením! Můžete je objednati a současně zaplatiti poštovní poukázkou,na jejíž ústřižek objednávku poznamenáte. V ostatních případech zašlete nejprve objednávku a vyčkejte,až dostanete od nás složenku, což je důkazem,že objednané máme připraveno k odeslání a čekáme jen na zaplacení. Platy složenkou nás docházejí teprve za 10 až 13 dní. Uvažte tuto skutečnost!

Ochotně a rádi Vám posloužíme. Nezasíláme však nic na úvěr, rovněž ne na dobírku. Nežádejte výjimek z tohoto zařízení. Ztěžujete nám tím naši práci.

Objednávky vyřizuje :
Jaroslav Šustr, Dlouhá 10
Praha I.

---

| | |
|---|---|
| ESPERANTISTA 1950 | 6,-- |
| ESPERANTISTA lasta jarkolekto/1951/enestas:ESP.-ĈEĤA kaj ĈEĤA-ESP.vortaroj kaj MALGRANDA KORESPONDANTO... | 12,-- |
| URBO EN LA SIGNO DE FAJRO /Majerová/ | 6,40 |
| SEPTEMBRO /Milev/ | 2,-- |
| O ZKOUŠKÁCH Z ESPERANTA /Kamarýt-Pumpr/ | 2,50 |
| POŜTKARTOJ kun portreto de Zamenhof /Bartošík/ 10 ekz. | 2,50 |
| GLUMARKOJ de Bartošík trikoloraj 50 ekz. | 2,50 |
| ESP.INSIGNO-verda stelo sur blanka fono | 3,-- |
| ELEKTITAJ RAKONTOJ /Jovkov/ | 4,-- |
| RIMPORTRETOJ/Kalocsay/ | 5,-- |